



Fonduso Instigo-Liberapay

kaj mia reta agado ĝenerale

Detala raporto pri 2020

Versio por ĉefaj donacintoj kaj kunlaborantoj



Kun aldono pri mia eksterreta agado, kaj pri miaj planoj por 2021

Yves Nevelsteen

16 februaro 2021

Yves Nevelsteen
yves@ikso.net
www.nevelsteen.info



La fonduso Instigo-Liberapay, sub la aŭspicioj de UEA, subtenas Esperanto-agadojn, kiuj celas provizi retajn servojn en Esperanto. Kiel komisiito de UEA pri reta agado, mi gvidas la laborojn.

Homoj kiuj kontribuas al komunaĵoj bezonas vian subtenon. Konstruado de libera programo, disvastigado de libera scio, tiuj aferoj postulas tempon kaj kostas monon, ne nur por fari la komencan laboron, sed ankaŭ por daŭrigi ĝin dum tempo.

La sistemo de periodaj donacoj de Liberapay estas desegnita por provizi stabilan amasfinancitan bazan enspezon al kreantoj, ebligante ilin daŭre fari la laboregon, kiu profitas al ĉiuj.

www.instigo.be



Provlegita per LanguageTool.org kaj de Fransoazo Noireau kaj Robin van der Vliet. Dankon!

Ĉi tiun raporton vi povas libere elŭti de la projekta retejo
www.instigo.be/raportoj/2020-dk-versio1-8.pdf

versio 1.8

Prezento de la fonduso

Instigo-Liberapay, sub la aŭspicioj de Universala Esperanto-Asocio, subtenas Esperanto-agadojn, kiuj celas provizi retajn servojn en Esperanto. Mi gvidas la laboron kaj iĝis en 2020 komisiito de UEA pri reta agado.

Jen superrigardo de la diversaj projektoj, kiujn vi subtenas per donaco al Fonduso Instigo. Ĉu vi volas subteni specifan projekton aŭ aganton? Tio eblas – sendu retmesaĝon al mi.

Eventa Servo (www.eventaservo.org) estas moderna internacia kalendaro pri Esperanto-rilataj eventoj. Fernando Ŝajani kaj mi respondecas kaj multe okupiĝas pri la retejo Eventa Servo nome de UEA kaj TEJO. Via subteno helpas teni la retejon funkcia kaj instigas konstante provizi plibonigojn al ĝi. Subtenu ĝin ankaŭ per aldono de viaj eventoj kaj registro de via organizaĵo kaj de vi mem kiel uzanto!

Komputeke (www.komputeke.net) estas prikomputila terminokolekto. Multaj homoj pretas iom helpi pri tradukado, sed gravas bona, daŭre aktualigata vortaro kaj iu, kiu kunordigas kaj instigas al kunlaborado kaj dankas kontribuantojn. Sen tio, tre indaj tradukprojektoj kiel Komputeke ne progresas aŭ eĉ mortas. Menciindas, ke mi kunlaboris kun Robin van der Vliet pri tutnova retejo por Komputeke. Krei ĝin estis multege da laboro, sed tre indis.

Tradukado de Telegram (www.telegramo.org) kaj **WordPress** (www.wordpress.com) al Esperanto: Robin van der Vliet estas la ĉefa tradukanto (al Esperanto) kaj disvastiganto de Telegram en Esperantujo. Mi transprenis la ĝisdatigadon de la Esperanto-traduko de WordPress de Cindy McKee laŭ peto de Kalle Kniivilä, ĉar interalie ĝin uzas la retejo Libera Folio. Ambaŭ traduklaboroj samtempe uzas kaj estas gravaj fontoj por novaj vortoj en Komputeke. Gravas instigi al ĉiam-aktuala traduko de tiuj kaj aliaj platformoj, kiuj utilas al esperantistoj kaj montras la uzatecon de Esperanto!

Vikipedio, Vikidatumoj kaj aliaj wikimediaj retejoj (<https://eo.wikipedia.org> – <https://wikidata.org>) estas nemezureble gravaj por

la teno de la memoro de Esperanto kaj ankaŭ por montri la diversecon de la uzo de nia lingvo. Robin kaj mi programis per robotoj lingvan korektadon en Vikipedio kaj instigas al verkado kaj ligado de interesaj artikoloj, partnerece kun la faka grupo ELiSo (Esperanto kaj Libera Scio, www.esperanto.wiki), kun kiu UEA kunlaboras. Via subteno instigas al la aktualigo kaj daŭra riĉigo de la enhavo de Vikipedio kaj rilataj retejoj!

Eksterrete (www.nevelsteen.info/eksterrete): Ĉio troviĝas sur la interreto, sed gravas gvidi homojn kaj indiki, kio konkrete interesas kaj aktualas. Tial Eksterrete! Temas pri regule ĝisdatigataj paperaj kaj bitaj libretoj kun retaj indaĵoj. Kompreneble ne sufiĉas krei tian verkon unufoje: necesas ĝin regule ĝisdatigi. Via subteno instigas al la regula aperigo de Eksterrete, kiu estas ilo aparte utila por pli aĝaj esperantistoj kaj por komencantoj. Estas ĝoje kompleze provizi al ili tiujn libretojn – kaj via subteno ebligas tion!

Markolibro (www.nevelsteen.info/markoj): Neesperantistaj asocioj kaj firmaoj kiuj tamen konscie elektas nomon en Esperanto estu niaj ambasadoroj! Esperanto estas pli populara ol multaj imagas, almenaŭ pri tio... La Markolibro ne nur helpas esperantistojn konscii pri grupoj, kiuj proprainiciate elektas nomon en Esperanto, sed montras al tiuj grupoj, ke nia komunumo pozitive atentis pri ili. Tio naskas eblojn por pluraj kunlaboroj kun grupoj, kiuj agadas komerce aŭ pri aliaj kampoj de nia socio. Mi intertempe laboras pri nova, kvinlingva eŭropa Markolibro, kiu povos evolui al tutmonda markolibro. Temas pri longedaŭra projekto. Regule aperas novaj markonomoj; gravas ilin kolektadi.

BitArkivo (www.bitarkivo.org) estas kunlaborema komunumo kiu volas bitigi la Esperantan kulturon kaj tiel ĝin konservi por ĉiam. Iván Garcia respondecas. La teamo de BitArkivo kunlaboras kun asocioj, bibliotekoj kaj volontuloj por skani malnovajn Esperantajn librojn kaj revuojn, ordigi ilin kaj faciligi la legadon de la enhavoj, ktp. Via subteno helpas daŭrigi la skanadan laboron de malnovaj Esperanto-periodaĵoj por ke nia Esperanto-historio ne malaperu. Subtenu ĝin ankaŭ sendante skanaĵojn de viaj malnovaj gazetoj/libroj!

Spezoj

Universala Esperanto-Asocio (UEA) ne nur aŭspicias, sed ankaŭ finance subtenas Fonduson Instigo. Se vi volas scii pri detaloj, kontaktu min.

Enspezoj de aliaj fontoj

Ĉar donacoj al fonduso Instigo estas anonimaj, ne ĉiam eblas ekscii kiu konkrete donacis. Jen kelkaj ĉefaj donacintoj, pri kiuj mi ja scias:




- Mireille Grosjean por Eventa Servo
- Ivo Durwael por la agado de Yves
- Belga Esperanto-Federacio por la agado de Yves
- La Erikejo (loka klubo Kalmthout-Belgio) por la agado de Yves
- La Progreso (loka klubo Gent-Belgio) por la agado de Yves
- Esperanto 3000 (loka klubo Lovenjo-Belgio) por la agado de Yves
- Iwona Kocięba por la agado de Yves
- Kalle Kniivilä por la traduko de WordPress
- Didier Loison por la fonduso (ĝenerale)
- Xavi Alcalde por BitArkivo



Koran dankon al ĉiuj donacintoj!

Je la 26-a de januaro 2021, la fonduso ricevis 39,92 eŭrojn semajne de 20 donacantoj. La celo estis 50 eŭrojn semajne en 2020. En 2021 mi celas 100 eŭrojn semajne.

Malfacilas nuntempe konvinki homojn subteni fonduson. Tion oni kutime faras persone, dum renkontiĝoj. Ĉar ĉiuj ĉeestaj renkontiĝoj nuliĝis, mi antaŭvidas, ke la enspezoj ne rapide multe kreskos. Ni bezonos tempon. Mi tamen maksimume mencias Fonduson Instigo dum retaj prezentoj kaj en diversaj eldonoj. Ankaŭ aperas ligiloj al la fonduso ĉe pluraj retejoj (www.komputeko.net – www.eventaservo.org – www.telegramo.org).



Eventa Servo


Kernaj agantoj

- Fernando Ŝajani: kreinto, programisto
- Yves Nevelsteen: ĉefhelpanto, konsilanto, testanto de novaj funkcioj kaj komunikanto (kun uzantoj kaj gazetaro).

En 2020 nin ne vere helpis multe eksteruloj. Ni ja ricevis multajn komentojn de uzantoj; laŭ mi ni sukcesis ĉiufoje rapide agi kiam aperis grava cimo aŭ bezono je nova funkcio.

Uzantoj

La uzantaro de Eventa Servo en 2020 impone kreskis: de 378 en februaro al **851** en decembro (16 feb. 2021: **954!**). Temas pri esperantistoj kiuj registriĝis en la retejo per la paĝo <https://eventaservo.org/r> por per ĝi diskonigi eventojn.



Entute jam 6300+ eventoj estas registritaj en Eventa Servo.

Ni instigis UEA (Fernando Maia kaj Aleks Kadar) kaj TEJO (Charlotte Scherping Larsson) sisteme diskonigi ligilojn al eventoj en Eventa Servo anstataŭ sendi retmesaĝon aŭ afiŝi konkretajn informojn en Facebook kaj Telegram. Ne nur estas tio bona ideo, ĉar tiel UEA pli disvastigas Eventan Servon, sed ankaŭ oportunas: eblas aldoni bildojn kaj se estas lastmomentaj

ŝanĝoj, ilin eblas facile fari en Eventa Servo. Ne necesas sendi kroman retmesaĝon aŭ publikigi novan afiŝon. Estas tamen afero de al kutimiĝo.

Gravas la konstato, ke mi mem ne plu enigas multajn informojn. Mi precipe okupiĝas pri kontrolado kaj respondado de demandoj senditaj al <kontakto@eventaservo.org>. Antaŭe mesaĝojn al tiu retroŝtadreso ricevis Fernando Ŝajani kaj li ilin al mi plusendis; nuntempe mi rekte ricevas ilin.

GitHub

Ni uzas GitHub, interalie por noti cimojn (= programerarojn) kaj kolekti ideojn pri plibonigoj. Estas nun en la GitHub-deponejo de Eventa Servo 102 eroj pri kiuj ni okupiĝas. La listo estas libere alirebla: <https://github.com/eventaservo/eventaservo/issues>

Diskonigo kaj varbado

Por ankoraŭ pli vaste diskonigi Eventan Servon, mi kreis filmeton (vidu <https://nevelsteen.info/miaj-prelegoj/eventaservo-2020>). Tiun oni montris dum la Virtuala Kongreso de Esperanto 2020. Poste mi respondis al demandoj en la vidbabilejo.



Ankaŭ Fernando Ŝajani kreis mallongan filmeton, en kiu li parolas pri siaj planoj. Li kreis tiun filmeton por Somera Esperanto-Programado (kiun mi kunorganizis). <https://mallonge.net/prelego-sep2020-fernando>

Nova serĉilo

Ni lanĉis novan, multe pli praktikan serĉilon por la retejo.

Kiam en la ĉefpaĝo oni entajpas ion en la serĉujo, aŭtomate serĉo ekas post 3 sekundoj. Per la nova serĉilo eblas ankaŭ facile trovi pasintajn kaj nuligitajn eventojn.

ORGANIZOJ
2 organizoj trovitaj
Nomo
Flandra Esperanto-Ligo
Krefelda Esperanto-societo

EVENTOJ	
63 eventoj trovitaj	
Titolo	Dato
Esperanto-lecionoj por komencantoj kaj komencintoj	ĵaŭdo, 21 februaro 2019
Esperanto-lecionoj por komencantoj kaj komencintoj	ĵaŭdo, 28 februaro 2019
Kunveno de Esperanto Limburgo	ĵaŭdo, 28 februaro 2019


Reklambutonoj

Fine de junio ni pretigis “reklamrubandan sistemon” por ES. Ni alvokadas organizantojn sendi al ni reklamon, kiun ni provizore senpage afiŝas. Mi ekzemple petis de Paul Peeraerts sendi al mi reklambutonon pri Monato kaj aldonis ĝin. Celoj estas interalie instigi Paul daŭrigi pri la kreado de monataj/Monataj filmetoj por prezenti la magazinon - kaj diskonigi la agadon de lia teamo. Vidu <https://eventaservo.org/e/f7fe80>

Mi instigis plurajn aliajn krei reklambutonojn, sed ĝis nun nur malmultaj organizantoj de eventoj uzis tiun eblon. Mi persiste daŭrigos tiun instigadon.

Novaĵoj pri Eventa Servo

Fernando Ŝajani aldonis novan butonon al la ĉefpaĝo de Eventa Servo. Ĝi ligas al la Telegram-novaĵkanalo <https://t.me/s/eventaservo> kiun mi kreis.



La kalendaro de Eventoj

<http://eventoj.hu/kalendaro.htm>

Jam delonge mi estis en kontakto kun Szilvási László pri la kalendaro de Eventoj. Ni buŝe interkonsentis, ke Eventa Servo estu ĝia oficiala posteulo, kondiĉe ke fine de 2020 ĝi daŭre plu ekzistu kaj bonfartu. Intertempe aperas la jeno en la retejo de Eventoj: *La aktuala Kalendaro translokiĝis al “Eventa Servo”, ĉi tie troveblas la arkivo de la origina servo.*



Nova subpaĝo: instruistoj kaj prelegantoj

Laŭ sugesto de Ahmad Reza Mamduhi, Mireille Grosjean petis de ni, ke ni kreu novan subpaĝon en la retejo de Eventa Servo pri instruistoj kaj prelegantoj. Mireille finance kontribuis al la fonduso Instigo-Liberapay, por ke ni prioritare okupiĝu pri tio. Intertempe ĝi estas realigita, vidu https://eventaservo.org/instruistoj_kaj_prelegantoj

Korektado kaj sugestado

Iom mi okupiĝis en 2020 pri korektado de enigitaĵoj. Mi ekzemple atentigis plurajn registritojn ne uzi majusklojn en titoloj. Ankaŭ lingvajn erarojn mi foje korektis, aŭ ŝanĝis iksojn al ĉapelitaj literoj ktp.

Ĉar multaj eventoj okazas rete, mi ofte igis enigitaĵojn Zoom-ligilojn “alklakeblaj”. Plurfoje mi aldonis bildon al evento, ĉar tiu aperas, kiam oni diskonigas eventon per Telegram aŭ Facebook. Ĉiufoje kiam mi ion ŝanĝas, mi informas pri tio la eniginton de la koncerna evento.

Ni multe pli-profesiigis nian komunikadon. Jen ekzemplo de duon-aŭtomata retmesaĝo kun alvoko subteni Instigo-Liberapay!

Saluton.

Iu havas demandon aŭ raportas problemojn pri la evento "7a babilaro Parizo/Romo", kiun vi administras en Eventa Servo. Ĉu vi povas kontroli tion kaj korekti, se necese?

Jen la mesaĝo:

"Saluton Mi alklakebligis la Zoom-ligilon" - Yves Nevelsteen



Eventa Servo estas senpaga servo de UEA kaj TEJO. Ĉu ĝi plaĉas al vi? Subteni retajn agantojn, ekzemple per 1 EUR semajne, eblas per la fonduso [Instigo-Liberapay](#).

Mesaĝo aŭtomate sendita de [Eventa Servo](#)
Kontaktu nin per kontakto@eventaservo.org

Partopreno-avizo kaj memoriga retmesaĝo

Ni ellaboris sistemon, en kiu homoj povas indiki ke ili intencas partopreni eventojn. Kiam iu elektas "Mi partoprenos", du horojn antaŭ la komenco de la evento tiu ricevos memorigan retmesaĝon.

Eventa Servo

to me

Wed, Feb 10, 9:33 PM (6 days ago)

☆ ↶ ⋮

Saluton.

Vi intencas partopreni la eventon [Vespero 3000: prelego de Ivo Schenkel](#) pri Tajlando.

Ĝi baldaŭ komenciĝos!

VIDI LA EVENTAN PAĜON



Eventa Servo estas senpaga servo de UEA kaj TEJO. Ĉu ĝi plaĉas al vi? Subteni retajn agantojn, ekzemple per 1 EUR semajne, eblas per la fonduso [Instigo-Liberapay](#).

Ŝanĝoprotokolo

Aldoniĝis nova paĝo: ŝanĝoprotokolo. Tie Fernando Ŝajani aldonas ŝanĝojn post kiam li faris ilin. <https://eventaservo.org/changelog>

Komputekeo

Aperis en majo 2020 nova Komputekeo-retejo. Mi verkis pri ĝi detalan (teknikan) raporton; vidu <https://mallonge.net/Komputekeo-raporto2020>

Estas kreita Telegram-grupo de Komputekeo kiu jam havas preskaŭ 100 membrojn. En ĝi ni parolas pri komputilaj vortoj kaj projektoj. Ekzistas ankaŭ aparta Telegram-grupo ‘Komputekeo-administraĵoj’ per kiu ni kolektadas erojn, kiujn ni ŝanĝu aŭ aldonu.

Ni aldonis kelkajn kromajn interfaclingvojn. La interfaco de Komputekeo nun ekzistas jam en 11 lingvoj. La lastaj aldonitaj lingvoj estas la rumana kaj la portugala. Robin kreis subdomajn por rekte aliri la lingvajn versiojn: <https://ru.komputekeo.net> - <https://pt.komputekeo.net>

Komputekeo Загрузки Книги Источники Связаться Поддержать <> GitHub Ещё Тёмный Язык ▾

Выбрать языки ▾

Komputekeo (сокращение для prikomputila terminokolekto) - интернет-проект, цель которого собрать словарь по информационным технологиям для как можно большего числа языков для стимуляции использования точно переведённых терминов. Вы найдёте здесь переводы компьютерных терминов на многие языки.

Компьютекеа является официальным проектом международной эсперанто-организации E@I. Информация Компьютекеи распространяется под лицензией [CC BY-SA 4.0](#).

Вам понравилась Компьютекеа и вы хотите поддержать нас? Это возможно с помощью [Liberapay](#).

Последнее обновление данных: 2020-06-23

Dima Ŝevĉenko rakontis al mi, ke grava moskva ĵurnalo intervjuis lin. Oni menciis Komputekeon; certe estas do senhave ke ĝia interfaco kun enkonduka teksto ankaŭ ekzistu en la rusa.

28/6 Dank’ al Nick Fenikals, la interfaco de la Komputekeo-retejo nun ankaŭ ekzistas en la rumana. Kial ne? :-)

Komputekeo Descărca Cărți Sursele Contact Propti <> GitHub Mai mult Întuneceat Limbă ▾

Selecțai limba ▾

Komputekeo (prescurtarea de la prikomputila terminokolekto, în Esperanto: pentru colectare terminologia computerelor) este internet-proiectul, al cărei scop este crearea unui dicționar în cât mai multe limbi posibile, în vederea încurajării utilizării unor termeni traduși corect. Deci, poți găsi traduceri termenilor din informatică în multe limbi.

Komputekeo este un proiect recunoscut oficial de organizație internațională a esperanto E@I. Bază de date din Komputekeo disponibilă gratuit sub licența [CC BY-SA 4.0](#).

Vreți să scrii în Komputekeo? Acest este nodulul ei [liberapay](#).

23/6 Bart Demeyere kontaktis min pri diversaj eraretoj en la Komputeke-datumbazo. Mi korektis ilin kaj pridiskutis kun Bart liajn planojn novigi lian retan vortaron <https://kono.be/vivo>

Retbutiko de FEL: e-libro -> bitlibro (ekzemplo)

Gravas por mi, ke esperantistoj uzu la samajn vortojn por samaj aferoj, se temas pri komputilaĵoj. Nuntempe, oni parolas pri 'bitlibro'. Tiu vorto antaŭe ne vere estis uzata; cirkulis variantoj kiel cifereca libro, elektronika libro ktp. FEL ekzemple uzis 'e-libro'. Tio estas iom konfuza vorto, ĉar malklaras, ĉu temas pri Esperanta aŭ elektronika libro ktp. Iel ajn, en julio 2020 mi proponis al FEL ŝanĝi tion en ĝia retbutiko – intertempe ili realigis la necesajn adaptojn. Ŝajnas temi pri eta modifo, sed pri ĝi fakte tamen okupiĝis tri personoj: Paul Peeraerts, Gerd Jacques kaj Bart Demeyere. Necesis ŝanĝi la datumbazon kaj eĉ reprogrami parton de la retbutika programaro!



Klavaro

Mi iom kunlaboris en junio kun Lanjo (@kvinalavurso) pri nova Esperanta klavaro. Ŝi interalie uzis vortliston de Komputeke por ĝi; mi testis kaj provlegis la klavaron. Interalie mi helpis Lanjon pri kodoreprezenta eraro en UTF-8-teksto.

Gravas laŭ mi, ke 'instiganto' de tempo al tempo konkrete informpetu pri progresoj de projekto. Tio tre helpas pri motivado; ni ĉiuj foje demandas nin ĉu indas pri io okupiĝi, ĉu entute utilas ktp.

La komputeke pliejo


Adreso: <https://pliejo.komputeke.net/>

En la pliejo, mi donas **superrigardon de tradukataj programoj**. Traduki programojn kaj retejojn al Esperanto indas, sed ne estas facile. La ĉefa defio estas teni la tradukon je 100% (aŭ almenaŭ je alta nivelo). Regula instigo de volontuloj estas nepre parto de tiu laboro.

<https://pliejo.komputeke.net/esperantigataj-programoj-kaj-retejoj>

DuckDuckGo, alternativo por Google, ekzistas en Esperanto, sed estis pluraj problemoj kaj mankantaj tradukoj. Mi pretigis novan tradukon surbaze de Komputeke. Robin ĝin provlegis kaj alŝutis. Vidu <https://duckduckgo.com/> Intertempe aldoniĝis kromaj tradukendaj frazoj; mi provos regule aktualigi la tradukon kaj serĉas volontulojn por helpi min pri tiu tasko.

Mi ricevis la ĉi-suban mesaĝon. Por danki Auguston kaj motivigi lin daŭrigi la laboron, mi petis de la tradukinto ĉu mi rajtas aldoni informojn pri lia traduklaboro al mia Komputeke-pliejo <https://pliejo.komputeke.net/esperantigataj-programoj-kaj-retejoj> Mi pensas, ke tio vere instigas.



Mi okupiĝas pri dokumento **Oftaj eraroj** - kolektas ilin tra la tuta jaro. Mi kreis kronviran frazaron. Mi resumis/redaktis ĝin kaj sendis du artikolproponojn al UEA Facila. <https://pliejo.komputeke.net/kronvirusaj-vortareto-kaj-ekzempla-frazaro>

Telegram

Ĉar mi sincere kredas, ke Telegram pro diversaj kialoj estas multe pli uzinda ol WhatsApp kaj Messenger, mi persone engaĝiĝis kaj ek-varbis por ĝi. Unu el la kialoj estas, ke Telegram estas la sola mesaĝilo kiu ekzistas en bone tradukita Esperanto. Homoj ekzercas la lingvon, uzante ĝin. Mi laboris plurajn tagojn por krei filmetan prezenton pri Telegram. Ĝi estis montrata dum la Virtuala Kongreso de Esperanto en la somero de 2020; vidu <https://mallonge.net/telegram-filmeto>

Ni fintradukis Telegram al Esperanto. Entute temis pri pli-malpli 16 000 frazoj. Aperis novaj tradukendaj ĉenoj; Robin kaj mi tradukis ilin. Denove estis 100%-e tradukita (17 jan. 2021: 98%). Aldoniĝis ĉi tiu paĝo al la retejo: <https://telegramo.org/esperantigo/>

27/10: Mi plu korektis 100 frazojn en Telegram; Robin aprobis. Oni aldonis multajn frazojn por ebligi video-alvokojn per Telegram.

Robin havas nun aliron al kelkaj statistikoj. Evidentiĝis, ke malmultaj esperantistoj uzas Telegram en Esperanto. Jen statistikoj de la Telegram-grupo Esperantujo:


Uzantokvanto - lingvo

62 - germane / 120 - france / 158 - ruse / 171 - portugale / 234 - hispane / **395 - Esperante** / 436 - angle

Ni esperas ke ĉi tia aldono al la interfacoj de diversaj babilejoj helpis/os:



Robin aldonis la lingvon de la retumilo al ĉi tiu demando en Telegram por ebligi al ne-esperantistoj aliri Esperantajn kanalojn. Ni havas tradukojn al 42 lingvoj nun. Kiam la uzanto uzas interfacolingvon, kiu mankas, tiam la uzanto vidas anglan frazon apud la Esperanta frazo.



Mi individue helpis Dima Ŝevĉenko de Revuo Esperanto pri Telegram. Ĉar en Rusio ne eblis elŭti ĝin, mi alŭtis la instalodosieron al la Komputekoretejo por lin helpi. Ankaŭ mi klarigis la diferencon inter grupo kaj kanalo ktp. Li nun multe uzas ĝin por disvastigi informojn pri la revuo Esperanto. Li ankaŭ organizas per ĝi virtualan trinkejon, ekzemple.

Mi verkis varban artikolon pri Telegram por la flandra revuo Horizon-taal (majo 2020). Vidu <https://mallonge.net/Telegram-Horizont-taal-2020>


Ekde 2021 mi pli kaj pli uzos Telegram kaj forlasas Facebook. Mi ankaŭ pliigos mian varbadon. Jen ekzemplo de tio kion mi celas: <https://mallonge.net/LF-Telegram-jan2021>

Ĉu ĉiuj esperantistoj ekuzu Telegram? Kaj kial?

de *Redakcio* je 2021-01-29 en *interreto*

Ĉu la retaj gigantoj jam havas tro da potenco? Ĉu esperantistoj devus ekserĉi alternativojn? Tion opinias Yves Nevelsteen, komisiito de UEA pri reta agado, kiu aktive instigas esperantistojn ekuzi Telegram. Ni petis lin klarigi kial Telegram laŭ li estas la plej bona mesaĝilo por esperantistoj – kaj por ĉiuj aliaj.

Antaŭ nelonge la tujmesaĝilo WhatsApp ŝanĝis sian privatecpolitikon. Uzantoj kiuj malakceptas la novajn uzkondiĉojn, ekde februaro 2021 povos perdi la aliron al Messenger-babilejoj kaj eĉ al sia Facebook-konto. Kiam al tio aldoniĝis la silentigo de la prezidento de Usono en Twitter kaj Facebook, multaj homoj serioze ekserĉis alternativojn por Facebook, Messenger kaj WhatsApp.



WordPress 5.6

Neniam antaŭe kunhavigo de
viaj rakontoj estis pli facila



Ekranaĵ agordoj ▾ Helpo ▾

Panelo

Bonvenon al WordPress!

Ni kolektis kelkajn ligilojn por helpi al vi eklabori:

Kiel eki

[Tajlori vian retejon](#)

aŭ [komplete ŝanĝi vian etoson](#)

Sekvaj paŝoj

 Redakti vian ĉefan paĝon  Aldoni pliajn paĝojn  Viziti vian retejon

Pliaj agoj

 Administri kromprogrametojn  Administri menuojn  (Mal)ŝalti komentojn

 Lernu pli pri kiel komenci

Aktiveco

Lastatempe aperigitaj

7 maj 2020, 3:03 ptm	Kurso pri programado en Esperanto
1 maj 2020, 5:51 ptm	Skrablo en Esperanto
4 jul 2018, 12:12 ptm	Hello world!

Je ekrigardo

 3 afiŝoj  23 paĝoj

WordPress

WordPress iĝis la plej populara enhavmastruma sistemo en la mondo. Ĉe <http://eo.wordpress.org> oni povas akiri tiun liberprograman pakaĵon tute senpage. Ĝi estas uzata por starigi memstaran retejon. Por Esperantujo ĝi gravas, ĉar ĝin interalie uzas retejojn kiel <https://liberafolio.org> - <https://sezonoj.ru> - <https://ikso.net/> kaj <https://pliejo.komputeko.net> Laŭ peto de Kalle Kniivilä, antaŭ kelkaj jaroj mi transprenis la ĝisdatigadon de la traduklaboro de CindyMcKee. Mia intenco estas teni la tradukon je 100%. Pri tio ĝis nun mi sukcesas.

Tiun traduklaboron ne subtakso. Temas entute pri miloj da frazoj. Estis 200+ novaj teksteroj por la versio 5.5.

Preskaŭ ĉiujare WordPress ricevas novan defaŭltan tiel nomatan “etoson”. Por la intertempe aperinta versio 5.6. temis pri 162 frazoj. Feliĉe Google Translate multe helpas min. Cindy McKee el Usono ankaŭ helpas pri provlegado kaj konsultado. Novaĵojn pri WordPress en Esperanto mi afiŝas en la blogo <https://eo.wordpress.org/news/>

Ekzistas ankaŭ komerca projekto, wordpress.com. Pri tio mi malpli okupiĝas, sed tamen iom. En 2020 mi iĝis por ĝi “validiganto” kaj iom tradukis ankaŭ tie.

Kun Nicolas Ruggiero mi iom okupiĝis pri la esperantigo de

- Ninja Forms <https://mallonge.net/ninja-forms>
- Contactform7 <https://mallonge.net/contactform-7>

The screenshot shows the WordPress Translator Handbook page for the Twenty Twenty-One theme. The page is titled "New to Translating WordPress? Read through our Translator Handbook to get started." and includes a "Hide" button. The main content area describes the theme and its features. On the right, there is a progress bar for the translation of the theme's strings, showing 72% completion. Below the progress bar, there is a link to the "Locale Glossary". At the bottom, a red box highlights a message: "The initial language pack for the theme will be generated when 90% of the project strings have been translated (currently 72%)."

07:00 Zo 31 jan. translate.wordpress.org 100%

Register Log In

New to Translating WordPress? Read through our Translator Handbook to get started. Hide

Twenty Twenty-One is a blank canvas for your ideas and it makes the block editor your best brush. With new block patterns, which allow you to create a beautiful layout in a matter of seconds, this theme's soft colors and eye-catching — yet timeless — design will let your work shine. Take it for a spin! See how Twenty Twenty-One elevates your portfolio, business website, or personal blog.

[WordPress.org Theme Page](#)

Twenty Twenty-One Esperanto 72% eo Locale Glossary

All Sub-Projects

The initial language pack for the theme will be generated when 90% of the project strings have been translated (currently 72%).

[Locales](#) / [Esperanto](#) / [WordPress](#) / [5.6.x - Development](#)

New to Translating WordPress? Read through our [Translator Handbook](#) to get started.

[Hide](#)

Translation of the upcoming version of WordPress.
Translators: Please allow a reasonable time frame for validation of newly translated strings. You can always ping a validator from your [team](#) in the [#polyglots](#) slack channel

Translation of the development version of WordPress.
 Strings are taken from the code in [trunk](#) in the WordPress repository.



5.6.x - Development
 Esperanto
 eo
[Locale Glossary](#)

99%

All Sub-Projects

Set / Sub Project	Translated	Fuzzy	Untranslated	Waiting
5.6.x - Development 99%	4,147	0	1	0
Continents & Cities 100%	524	0	0	0
Administration 99%	3,307	0	5	0
Network Admin 100%	318	0	0	0

Translation Contributors

Contributor

Translations

	Cindio	TOTAL	TRANSLATED	SUGGESTED	FUZZY
Editor		4,592	4,592	0	0
Last translation submitted: 2 months ago		► Per project			

Translation Editors

These users can validate and approve your translations for this specific project.



yvesnev

[←](#)
[→](#)
[↺](#)
[🏠](#)

liberafolio.org/wp-admin/

Apps

★ Bladwiziers

📧 trou - FEL

📞 WhatsApp

📞 Si - Radio Edit - Zaz

📺 La eldona agado de...

📺 ZAZ Best Songs - Z...

📁 Mijn Drive

WordPress

🏠 Libera Folio

💬 1

➕ Nova

🏠

Panelo

⌚

Jetpack

📌

Afiŝoj

🔊

Aŭdvidaĵoj

📄

Paĝoj

💬

Komentoj 1

📋

Pritaksado

📊

TablePress

👤

Profilo

🔧

Iloj

📅

Agordoj

📈

Slimstat

🔍

Maletendi menuon

WordPress 5.6 estas havebla! Sciigu la retejan administranton.

Panelo

Je ekrigardo

📌 364 afiŝoj

📄 4 paĝoj

💬 5.372 komentoj

🗨 1 komento en atendovico

WordPress 5.5.3 uzante etoson Gatsby modifita.

Akismet

jam protektis vian TTT-ejon de 2.155 trudaj komentoj.

Nuntempe estas nenio en via

trudaja atendovico.

Aktiveco

Lastatempe aperigitaj

29 jan, 9:28

Ĉu ĉiuj esperantistoj ekuzu Telegram? Kaj kial?

24 jan, 12:47

Buller: "Lerni Esperanton plej gravas"

Rapida malneto

Titolo

Enhavo

Pri kio vi pensas?

Konservi malneton

Eventoj kaj novaĵoj pri WordPres

18

Vikipedio

Kiam mi volas ekscii pli pri temo, mi preskaŭ ĉiam iras al nacilingva Vikipedio... Krom kiam temas pri temo rilate Esperanton, tiam mi ja iras al la Esperanta Vikipedio. Ne eblas pri ĉio okupiĝi... mankas volontuloj... Laŭ mi, ni fokusu nian atenton je artikoloj pri la Esperanto-komunumo.

Mi persone verkis, kompletigis kaj lingve plibonigis vikipediajn artikolojn pri:

- Esperanto-verkistoj, artistoj, estraranoj... kiel
https://eo.wikipedia.org/wiki/Petro_De_Smedt
https://eo.wikipedia.org/wiki/Fernando_Maia_Jr
https://eo.wikipedia.org/wiki/Stela_Besenyi-Merger
- Gravaj verkoj, kiel
<https://eo.wikipedia.org/wiki/PIV>
https://eo.wikipedia.org/wiki/Oklingva_Proverbaro

Jam delonge mi realigas du etajn projektojn:

1. Aldonado de fotoj de esperantistoj: mi ekzemple tiel kompletigis la artikolon pri la verkisto Chris Declerck https://eo.wikipedia.org/wiki/Christian_Declerck Mi ek-kunlaboris pri fotoj kun Anna Striganova.
2. Aldonado de ligiloj sube de artikoloj: mi tiel ekzemple aldonis du prelegojn al la artikolo https://eo.wikipedia.org/wiki/Lu_Wunsch-Rolshoven

Jen superrigardo de ĉiuj miaj kontribuoj: <https://nevelsteen.info/vikipedio/miaj-kontribuoj>

Mi elektiĝis en la Revizia Komisiono de *Esperanto kaj libera scio* (ELiSo) kaj iom helpas KuboF Hromoslav pri la retejo <https://esperanto.wiki> Mi pretigas novan manlibron pri Vikipedio por spertaj redaktantoj. Malneton vi trovos en la paĝo <https://nevelsteen.info/vikipedio/nova-manlibro>

La Esperanta Vikipedio festos sian 20-jariĝon fine de la jaro 2021. Mi interalie kunlaboras kun Mireille Grosjean pri artikoloj.

Nova kontribuo

[?](#) [Helpo](#)

[📄 Nova paĝo](#)
[📄 Alŝuti plurmедion](#)
[📄 Traduko](#)

Kontribuoj de uzanto

Por [Yvesn](#) ([diskuto](#) | [protokolo de forbaroj](#) | [aŝiŝtoj](#) | [protokoloj](#) | [protokolo pri misuzado](#))

▼ Serĉu kontribuojn

(plej lasta | [plej frua](#)) Montri (pli novajn 50 | [pli malnovajn 50](#)) ([20](#) | [50](#) | [100](#) | [250](#) | [500](#))

- [20.39. 1 feb. 2021 \(malsamoj | historio\)](#) .. (-4) .. [Sten Johansson](#) (+ Dis - dua eldono) (**nuna**)
- [21.08. 31 jan. 2021 \(malsamoj | historio\)](#) .. (+17) .. [Cyrano de Bergerac \(verk\)](#) (Korektis la ligilon al Fonto (eldonejo)) (**nuna**)
- [21.06. 31 jan. 2021 \(malsamoj | historio\)](#) .. (+283) .. [Cyrano de Bergerac \(verk\)](#) (+ 5-minuta recenza filmeto)
- [18.40. 31 jan. 2021 \(malsamoj | historio\)](#) .. (0) .. [Klimata ŝanĝo](#) (**nuna**)
- [15.42. 31 jan. 2021 \(malsamoj | historio\)](#) .. (+145) .. [Oklingva Proverbaro](#) (+ bildaro)
- [15.11. 31 jan. 2021 \(malsamoj | historio\)](#) .. (-34) .. [Dosiero:ProverbaroOklingva-kovrilo.jpg](#) (koverto -> kovrilo) (**nuna**)
- [19.48. 30 jan. 2021 \(malsamoj | historio\)](#) .. (+129) .. [Marjorie Boulton](#) (→Eksteraj ligiloj: + du poemoj) (**nuna**)
- [19.36. 30 jan. 2021 \(malsamoj | historio\)](#) .. (+123) .. [Marjorie Boulton](#) (→Eksteraj ligiloj: Faciltingva artikolo)
- [12.00. 30 jan. 2021 \(malsamoj | historio\)](#) .. (+1) .. [Klimata ŝanĝo](#) (longdaŭra -> longedaŭra)
- [11.03. 30 jan. 2021 \(malsamoj | historio\)](#) .. (+80) .. [Filozofo](#) (→Eksteraj ligiloj: + Telegram-grupo por esperantistaj filozofoj) (**nuna**)
- [11.00. 30 jan. 2021 \(malsamoj | historio\)](#) .. (+130) .. [Nilo](#) (→Eksteraj ligiloj: KP185-Nilo La eble plej longa rivero de la mondo)
- [10.54. 30 jan. 2021 \(malsamoj | historio\)](#) .. (+188) .. [Krokodilo](#) (+ ekstera ligilo) (**nuna**)
- [15.16. 29 jan. 2021 \(malsamoj | historio\)](#) .. (+1) .. [Baza enspezo](#) (→Eksteraj ligiloj) (**nuna**)
- [15.15. 29 jan. 2021 \(malsamoj | historio\)](#) .. (+13) .. [Baza enspezo](#) (→Eksteraj ligiloj)
- [15.13. 29 jan. 2021 \(malsamoj | historio\)](#) .. (+109) .. [Baza enspezo](#) (→Eksteraj ligiloj: Filmeto de Chelsea Rae Moses)
- [16.54. 28 jan. 2021 \(malsamoj | historio\)](#) .. (+114) .. [Irena Alijoŝiŝite](#) (+ ligilo al nekrologo)
- [08.24. 28 jan. 2021 \(malsamoj | historio\)](#) .. (+93) .. [Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto](#) (Prezento de la teamo kiu kreas la sekvan version de PIV) (**nuna**)
- [20.28. 27 jan. 2021 \(malsamoj | historio\)](#) .. (-4) .. [Stela Besenvei-Merger](#) (→Eksteraj ligiloj) (**nuna**)
- [20.28. 27 jan. 2021 \(malsamoj | historio\)](#) .. (+162) .. [Stela Besenvei-Merger](#) (+ Podkasto kun intervjuoj)
- [20.23. 27 jan. 2021 \(malsamoj | historio\)](#) .. (+162) .. [Denaskaj Esperanto-parolantoj](#) (→Eksteraj ligiloj: + Podkasto kun intervjuoj) (**nuna**)
- [15.19. 25 jan. 2021 \(malsamoj | historio\)](#) .. (+180) .. [Impeto \(eldonejo\)](#) (→Eksteraj ligiloj: + VK 2020: Aŭtoro Momento kun Anna Striganova kaj Eldonejo Impeto + Telegram-kanalo de Eldonejo Impeto) (**nuna**)
- [22.13. 24 jan. 2021 \(malsamoj | historio\)](#) .. (+178) .. [Persa literaturo](#) (+ Antologia skizo de la persa literaturo) (**nuna**)
- [21.03. 23 jan. 2021 \(malsamoj | historio\)](#) .. (+90) .. [Oklingva Proverbaro](#) (→Eksteraj ligiloj: + Kelikaj specimenaj paĝoj)
- [20.52. 23 jan. 2021 \(malsamoj | historio\)](#) .. (-126) .. [Oklingva Proverbaro](#)
- [20.52. 23 jan. 2021 \(malsamoj | historio\)](#) .. (+18) .. [Oklingva Proverbaro](#)
- [20.51. 23 jan. 2021 \(malsamoj | historio\)](#) .. (+1 387) .. [Oklingva Proverbaro](#)
- [20.48. 23 jan. 2021 \(malsamoj | historio\)](#) .. (+26) .. [N Petro Desmet](#) (Alldirektigis al [Petro Desmet](#)) (Etikedo: Nova alldirektilo)
- [10.44. 22 jan. 2021 \(malsamoj | historio\)](#) .. (+30) .. [Oklingva Proverbaro](#)
- [10.43. 22 jan. 2021 \(malsamoj | historio\)](#) .. (+363) .. [N Dosiero:LaŜtonaUrbo-kovrilo.jpg](#) (== Resumo == {{justa uzo}} {{Informkesto justa uzo |Priskribo= la kovrilpaĝo de "Oklingva Proverbaro" |Fonto= Flandra Esperanto-Ligo |Artikolo= Oklingva Proverbaro |Kvanto= nur koverto |Malkvalita_distingivo= jes |Kialo= ilustraĵo por la artikolo |Nstataŭeco= ne anstataŭebla |alia_informo= }} == Permesiloj: == {{Justa uzo}})
- [10.30. 22 jan. 2021 \(malsamoj | historio\)](#) .. (+18) .. [Oklingva Proverbaro](#)
- [10.26. 22 jan. 2021 \(malsamoj | historio\)](#) .. (+529) .. [Oklingva Proverbaro](#)
- [10.24. 22 jan. 2021 \(malsamoj | historio\)](#) .. (+2 677) .. [N Oklingva Proverbaro](#) (Kreis novan paĝon kun "[[redaktas|redaktanto = Yves Nevelsteen |komenco = 22/01/2021 |fino = 30/01/2021 |daŭro = du semajnoj]] {{Informkesto Esperanto-libro | titolo = Oklingva Proverbar...")
- [10.01. 22 jan. 2021 \(malsamoj | historio\)](#) .. (+24) .. [La ŝtona urbo](#) (+ kovrilo) (**nuna**)
- [10.00. 22 jan. 2021 \(malsamoj | historio\)](#) .. (+340) .. [N Dosiero:LaŜtonaUrbo-kovrilo.jpg](#) ({{justa uzo}} {{Informkesto justa uzo |Priskribo= la kovrilpaĝo de "La Ŝtona Urbo" de Anna Löwenstein |Fonto= Flandra Esperanto-Ligo |Artikolo= La Ŝtona Urbo |Kvanto= nur koverto |Malkvalita_distingivo= jes |Kialo= ilustraĵo por la

Eksterrete

Ĉio estas trovebla en la interreto! Sed... multaj retejoj prezentas malaktualajn informojn kaj ne plu uzeblajn versiojn de programoj. Trovi la indaĵojn estas temporabe kaj foje iom malsimple.


Dum prelegserio pri komputilaĵoj kaj retaj projektoj en lokaj kluboj en Benelukso, mi rimarkis, ke tre mankas superrigardo de tiaj indaĵoj (kaj aktivaj) projektoj. Post prezento mi foje per retroŝto sendis la plej interesajn ligilojn al ĉeestintoj, sed tio klare ne sufiĉas.

Papera verko kun tekstaj klarigoj daŭre pli taŭgas por tiu celo. Do mi ek-kreis tion.

Google Translate <https://translate.google.com>

Google Translate estas tre konata, senpaga reta maŝintraduko kreita de la retentrepreno Google. Ĝi kapablas traduki vortojn, frazojn kaj retpaĝojn al pli ol kvindek lingvoj, inkluzive de Esperanto (ekde februaro 2012).

La tradukilo gajnis internacian konkurson pri la tradukado netonge post sia komenco je la printempo de 2006. Tamen ĝi ankoraŭ havas limigojn. Ĝiaj algoritmoj bazatas sur statistika analizo; do ĝi ne tradukas laŭ gramatikaj reguloj. Tial tradukita teksto povas havi sensencaĵojn aŭ evidentajn erarojn. Foje la ilo eĉ maligas la signifon de frazoj, precipe en lingvoj havantaj deklinaciojn.



En septembro 2017, Google multe plibonigis Google Translate per "neŭra maŝintraduko" por 96 lingvoj, inkluzive de Esperanto. Neŭra maŝintraduko uzas kompleksan procesadon por simuli kiel homo lernas lingvon. Plibonigoj estas plej rimarkindaj en tutaj frazoj kaj pli longaj tekstoj. Vi povas mem kontribui al Google Translate tradukante kaj aprobante frazojn: www.mallonge.net/quick-kontribui

Ilustrita oficiala radikaro esperanta www.mallonge.net/bazarradikaro

poŝtformata, ilustrita eldono de la Baza Radikaro Oficiala, aprobita de la Akademio. La praktika libreto enhavas simplajn, eĉ je baza nivelo kompreneblajn difinojn de la ĉ. 500 listigitaj vortoj, kaj tiaj povas esti utila helpilo por la lernantoj de la lingvo.

Lernu tradukvortaro www.lernu.net/vortaro

Krom multajn kursojn por diversaj niveloj kaj aĝoj, Lernu! havas ankaŭ plurajn aliajn servojn kaj ilojn. Multlingva vortaro estas unu el tiuj servoj.

Maĵstro tradukvortaro www.maistro.com

Maĵstro estas Esperanta multlingva tradukvortaro kreita de la nederlandano Gerard van Wilgen. Ĝi donas eblon serĉi tradukojn de vortoj en 50 lingvoj, simile al la projekto Ergane. Estas ankaŭ unika eblo elektu unikodan virtualan klavaron por enskribi vortojn laŭ la latina, la cirila aŭ la greka alfabeto.

Proverbaro www.proverbaro.net **MI REKOMENDAS**

Proverboj estas la ornamaĵo de la parolo. Rob Ketelaer kreis unuecan rete konsulteban kolekton kiu interalie bazigas sur la verkoj *Proverbaro Esperanta* de L.L. Zamenhof kaj *Een verzameling Esperanto Spreekwoorden* en Zogswijzen de M. de Waard.

Reta Vortaro (ReVo) www.reta-vortaro.de

ReVo estas ĝenerala Esperanta vortaro en interreto. Ĝi havas kaj esperantlingvajn difinojn de la kapvortoj, kaj **naĵlingvajn tradukojn**, krome aldonajn informojn kiel ekzemplajn frazojn, bildojn. Krom la lingvaj indaĵoj ĝi havas ankaŭ fakajn indaĵojn kaj tezaŭron. Je 2019-03-29:

- Kapvortoj: artikoloj: 11 752, derivaĵoj: 27 968, sencoj: 34 627
- Tradukoj: francaj: 40830, germanaj: 33 688, rusaj: 32 718...
- Fakvortoj: matematiko: 1289, zoologio: 1104, botaniko: 1021...


PreVo www.mallonge.net/prevo-android **MI REKOMENDAS**

PreVo - portebila versio de la Reta Vortaro estas elŝutebla en Google Play. Ĝi ne bezonas konekton al la interreto, estas rapide serĉebla kaj inkluzivas tradukojn al multaj lingvoj. Robin Hill kreis iOS-version.

Simple Vortaro www.simplevortaro.org **MI REKOMENDAS**

La Simple Vortaro estas interfacio por la difinoj de ReVo. Ĝi inkluzivas kelkajn helpojn kaj simplan strukturon. Oni povas uzi aŭ supersignojn aŭ la x-sistemon aŭ la h-sistemon (ekzemple: aŭ «ĵaŭdo» aŭ «ĵaŭdov» aŭ «ĵaŭdov» aŭ «ĵaŭdov»). Ankaŭ La Simple Vortaro komprenas la «i kaj «n» finigojn. Por «vortoj, oni povas serĉi ilin en la ŝan modo. Krome, ĝi enhavas malprecizan serĉilon. Se oni iomete eraras pri la literumado, La Simple Vortaro plejofte trovas la deziratan vorton.

Fine, estas vort-far-ad-ilo-o. Oni povas serĉi vortofaradojn kaj La Simple Vortaro provas diverŝi la derivaĵojn. Ĝi tio lufuje inkluzivas sensencaĵojn derivaĵojn, sed ĝi provas diverŝi la plej verŝajnan eblecon.



Eksterrete-n 1 mi aktualigis fine de 2019. La 25-an kaj la 26-an de majo mi laboris multe pri la nova versio de Eksterrete 2. Krystof Klestil de E@I promesis helpi min pri kreado de profesiaj kovrilpaĝoj por la diversaj libretoj. Mi esperas realigi tion en 2021.

Mi ankaŭ esperas povi realigi aliajn volumojn. Jen la ĝisnunaj planitaj volumoj:

1. Lerniloj kaj vortaroj
2. Bitlibroj kaj bitgazetoj
3. Podkasto kaj filmetoj
4. Blogoj kaj vlogoj
5. Teknikaj iloj kaj rekomendoj

Al la unuaj du eldonoj mi aldonis ĉi tiun tekston: “La nuna eldono estas 2020. Dank’ al subteno de la fonduso Instigo-Liberapay vi povas senpage elŝuti Eksterrete 1”.

Provlegita de Eddy Van den Bosch. Ĉiuj komentoj tre bonvenas. Dato: 22 majo 2020 Ĉiuj rajtoj rezervitaj de Flandra Esperanto-Ligo  Eksterrete estas projekto oficiale subtenata de UEA.	Ĝuu la esploradon! Yves  La fonduso Instigo-Liberapay, sub la aŭspicioj de UEA, subtenas Esperanto-agadojn, kiuj celas provizi retajn servojn en Esperanto. Kiel komisiito de UEA pri reta agado, mi gvidas la laborojn. Mi invitas vin subteni la kreadon, eldonadon kaj disvastigon de Eksterrete-libretoj per donaco al Instigo-Liberapay. https://eo.liberapay.com/instigo
--	---

Paperaj versioj de la Eksterrete-libretoj estas aĉeteblaj en la retbutiko de Flandra Esperanto-Ligo. Ilin presas por mi Ivo Vercammen, la vicprezidanto de FEL. Pro la kronvira pandemio, mi malmulte disdonis kaj vendis paperajn libretojn en 2020. En novembro 2019 mi ilin ekzemple donacis kaj vendis dum renkontiĝoj kaj dum mia novembra prelegvojaĝo tra Francio.

Vidu <https://nevelsteen.info/eksterrete> kaj <https://retbutiko.be/trovu/eksterrete>

Markolibro

Mi multe laboris en 2020 pri nova versio de mia kvinlingva eŭropa markolibro. Mi ankaŭ aktive kontribuis al la Facebook-grupo Komerca uzo de Esperanto (<https://mallonge.net/komerca>). Ekde 2021 mi uzas la grupon <https://markoj.telegram.org> por komuniki pri markonomoj.



De tempo al tempo mi kreas novan malneton de mia markolibro. Tiun mi rondsendas al interesitaj kunlaborantoj. Ĝi estas jam 177-paĝa, sen bildoj! Elŝutu la lastan malneton de <https://mallonge.net/markolibro-jan2021>

Brila Estonteco www.brilaestonteco.com

(brila estonteco = nl: fantastische toekomst - fr: à traduire - en: to be translated)

(eo) Instalita sur la antaŭkorto de la stacidomo de la Internacia Flughaveno Saint-Exupéry, impona skulptaĵo "Brila Estonteco" reprezentas Saint-Exupéry levante manon al la ĉielo.

(nl) XXX (fr) XXX (en) XXX

> Brila Estonteco, qui signifie en espéranto « Avenir radieux » symbolise la dynamique citoyenne, entrepreneuriale et administrative du territoire. L'oeuvre monumentale (3.20 mètres de hauteur), réalisée par le sculpteur Pascal Jacquet, a été inaugurée le 11 octobre 2017.⁶⁶

Brodarto www.brodarto.be bildo

(brodi = nl: borduren - fr: à traduire - en: to be translated & arto = nl: kunst - fr: de l'art - en: art).

(eo) Brodarto specialiĝas pri stebmaŝina brodado de emblemo aŭ rekte sur teksaĵoj.

(nl) Brodarto is gespecialiseerd in het machinaal borduren van een logo als badge of rechtstreeks op textiel.

(fr) Brodarto est spécialisé dans la broderie à la machine d'un logo sous forme de badge ou directement sur les textiles.

(en) Brodarto specializes in machine embroidery of a logo as a badge or directly on textiles.

> Brodarto, Esperanto voor Borduurkunst, leek ons een toepasselijke naam.⁶⁷

Salonbroso www.salonbroso.nl

DJ Bruselo www.facebook.com/Bruselo

(Bruselo = nl: Brussel - fr: Bruxelles - en: Brussels).

(eo) Bleri Lleshi (Blerim Gjonpalaj) estas filozofo, verkisto kaj parolisto. Lleshi havas artan projekton: DJ Bruselo. Kiel DJ, Lleshi volas montri la diversecon de muziko ludante muzikon el ĉiuj partoj de la mondo.

(nl) Bleri Lleshi (Blerim Gjonpalaj) is een filosoof, schrijver en spreker. Lleshi heeft een artistiek project: DJ Bruselo. Als DJ wil Lleshi de diversiteit van muziek aantonen door muziek uit alle delen van de wereld te spelen.⁶⁸

(fr) Bleri Lleshi (Blerim Gjonpalaj) est un philosophe, écrivain et conférencier. Lleshi a un projet artistique: DJ Bruselo. En tant que DJ, Lleshi veut démontrer la diversité de la musique en jouant de la musique de toutes les régions du monde.

(en) Bleri Lleshi (Blerim Gjonpalaj) is a philosopher, writer and speaker. Lleshi has an artistic project: DJ Bruselo. As a DJ, Lleshi wants to demonstrate the diversity of music by playing music from all parts of the world.

> Zijn artiestennaam is Bruselo (Esperanto voor Brussel)⁶⁹

Bufo www.bufo.be

(eo) Ekologia belga biero.

> Bufo is de Latijnse naam voor Pad, een amfibie-soort.⁷⁰

66 <http://www.linflux.com/lyon-et-region/antoine-de-saint-exupery-2/>

67 <https://brodarto.be/over-ons.html>

68 https://nl.wikipedia.org/wiki/Bleri_Lleshi

69 https://nl.wikipedia.org/wiki/Bleri_Lleshi

70 <http://bufo.be/ons-verhaal-en-missie/>

BitArkivo

Vidu www.bitarkivo.org kaj <https://mallonge.net/bitarkivo-prezento>

BitArkivo.org

NI PRIZORGAS LA ESPERANTAN KULTURON

BitArkivo estas kunlaborema komunumo kiu volas gardi la Esperantan kulturon por ĉiam. Ni jam arkivis

104 E-periodaĵojn kaj indeksis la enhavon de 9342 numeroj. Baldaŭ ni ankaŭ arkivos librojn, podkastojn kaj dokumentojn ĉe ĉiam funkciaj serviloj.



BitArkivo estas projekto komencita en januaro 2016 de Iván Garcia. La celo estas bitigi kaj enretigi Esperantajn materialojn. Ĉiuj arkivitaj materialoj estas senpage alireblaj en la oficiala retejo. Kopio troviĝas en la retarkivo Wayback Machine. BitArkivo kunlaboras kun esperantistoj, institucioj ne Esperantaj, lokaj bibliotekoj kaj esperantistaj kolektoj, bibliotekoj kaj arkivoj. Mi tre subtenas tiun manieron sekurigi bitajn revuojn kaj librojn, do kiam Iván kontaktis min por demandi, ĉu lia projekto rajtas aliĝi al Fonduso Instigo, mi jesis. Intertempe jam unu persono donacis specife por BitArkivo.

Aperis kelkaj lingvaj eraroj en la retejo de BitArkivo. Mi sendis al Iván korektproponojn. Mi ankaŭ kontaktadas lin pri plibonigoj kaj kompletigoj de lia retejo.

Instigaj filmetoj

Fine de 2019, komence de 2020, mi komencis krei filmetojn kaj ilin munti. Mi uzas plurajn programojn por tio, interalie HitFilm Express kaj PowerPoint. Estis iom temporabe ekscii kiu(j) programo(j) plej taŭgas por tiu celo, kaj lerni kiel efike uzi ilin, sed mi nun sufiĉe bone regas la tuton.

Filmetoj pri miaj projektoj

Mi kreis interalie jenajn filmetojn:

- Esperantaj markonomoj - <https://mallonge.net/markonomoj-filmeto>
- Eventa Servo - <https://mallonge.net/es-filmeto>
- Telegram - <https://mallonge.net/tg-filmeto>



Filmetoj de aŭtoroj

Ĉar ne plu okazas ĉeestaj renkontiĝoj, libroservoj apenaŭ plu vendas librojn. Se ni prezentas librojn per filmeto, eblas tiel iom varbi. Pluraj aŭtoroj neniam antaŭe estis filmitaj. Ni povas per filmado ilin danki pro la multjara laboro kaj samtempe disponas je filmmaterialo por arkivo. Konkrete mi kreis interalie jenajn filmetojn:

- Petro Desmet' prezentas sian verkon Esprimaro. Tio estis lia tutunua intervjuo! - <https://mallonge.net/esprimaro-filmeto>
- Vasta vortaro EO-NL PIV-ido: longa prezento fare de ĝia aŭtoro Petro Desmet. <https://mallonge.net/pivido-longa>
- PIV-ido - mallonga prezento por ne nederlandlingvanoj - <https://mallonge.net/pivido-mallonga>
- Intervjuo kun Lode Van de Velde pri lia romano Aspiroj <https://mallonge.net/aspiroj-filmeto>

Ceteraj filmetoj

Konkrete mi kreis interalie jenajn filmetojn:

- Zamenhoffesto 2019 de la antverpena grupo La Verda Stelo - <https://mallonge.net/LVS-zamfesto2019>
- Chiara Raggi - Koncerto 2019 - <https://mallonge.net/koncertobh>
- Belgio - prezento por Mondafest2020 - <https://mallonge.net/mf-belgio>

Instigo al sin-registrado

Fernando Ŝajani kreis plurajn filmetojn pri la teknika flanko de Eventa Servo, ekzemple por Somera Esperanto-Programado (evento kiun mi kunorganizis ĉeeste en 2019 kaj rete en 2020). Post tiu sperto li ankaŭ ek-prelegis pri Eventa Servo, vidu ekzemple <https://mallonge.net/fs-filmeto-es>

- Paul Peeraerts kreis superrigardan filmeton pri la eldonoj de FEL por montri dum la Virtualaj UK kaj IJK: <https://mallonge.net/filmeto-fel-eldonoj> Li ankaŭ komencis ĉiumonate per filmeto prezenti la novan eldonon de Monato, kies ĉefredaktoro li estas.
- Marc Vanden Bempt prezentas novan asocion: Internacia Esperanto-Arkivo. Mi muntis por li la filmeton. <https://mallonge.net/prezento-arkivo>

Varba filmeto (en la nederlanda)



Studento Yara De Coninck kun sia teamo kreis mallongan filmeton en la nederlanda pri kial mi okupiĝas pri Esperanto: <https://mallonge.net/waarom-Esperanto>. Mi disvastigis/as ĝin en kaj ekster Esperantujo. Laŭ peto de pluraj, ni kreis filmeton kun subtekstoj en Esperanto: <https://mallonge.net/kial-esperanto>

Invididua helpo kaj cetera agado

Mi instigis kaj praktike helpis esperantistojn uzi Zoom kaj Telegram. Mi kreis kanalojn ‘Belga Esperanto-Federacio’ kaj ‘La Verda Stelo’. Mi individue helpis Ivo Durwael, Griet Symoens, Ward Kusters, Kristin Bauwens pri kaj per Zoom.

En aprilo mi helpis pri la okazigo de la reta Malferma Tago de UEA. Mi konsilis Fernando Maia pri Zoom kaj Telegram kaj instigis belgojn ĝin partopreni per diskonigo en FB ktp.

- 31/03/2019: Kelkaj homoj multe laboris pri tradukado de GNOME al Esperanto. Bedaŭrinde ili ne sukcesis pasi la limon de 80% por akiri la oficialan staton ke GNOME estas tradukita al Esperanto. La tradukskipo maltrafis tiun limon nur per 2 aŭ 3 elcentoj <https://help.gnome.org/misc/release-notes/3.32/i18n.html.en>
-> mi sendis al kelkaj homoj “Eble kun via helpo, venontfoje ili ja sukcesos!”
- 28/4 mi korektis la tradukon de Liberapay. Bonegas, ke ekzistas tia monkolekta retejo en Esperanto! Ĝin uzas krom Fonduso Instigo interalie Bertilo Wennergren.
- 12/6 mi testis iOS-version 3.7 de Amikumu. Mankis kelkaj tradukoj kaj iuj ekranoj ne estis en ordo.


Benelukso.eu

Per ĉi tiu retejo, origine kreita por la Beneluksa Kongreso, mi interalie eksperimentas per Telegram-aj novaĵkanalo kaj fotokanalo. Novaĵkanalo Beneluksa havas 47 abonantojn. Mi diskonigis per ĝi 293 ligilojn al prilingvaj artikoloj. Fotokanalo Beneluksa celas diskonigi altkvalitajn senkopirajtajn fotojn de Esperanto-kunvenoj, uzeblaj dum prezentoj, en revuoj ktp. Ĉar nenio okazis en 2020, apenaŭ estis aldonitaj fotoj.

Robin van der Vliet transprenis la gastigon de la retejo www.benelukso.eu kaj instalas novan WordPress-retejon en <https://nova.benelukso.eu/> Mankis tempo por ĝin ellabori.

Esperantaj Libroj

Mi detale provlegis la novan apon de Vinicios Torres kaj donis kelkajn konsilojn. Vidu <https://mallonge.net/libroapo>



Mallongigiloj

Mallonge.net estas projekto de E@I realigita kadre de la 1a SEP (Somera Esperanto-Programado) en 2019 danke al subteno de ESF. La projekton proponis mi kaj realigis Michal Matúšov (KuboF Hromoslav) kun teknika subteno de Matthieu Desplantes kaj organiza subteno de Peter Baláž.

En 2020 aperis novigita interfacio kaj mi plu privarbis ĝian uzadon; ekuzis la mallongigilon interalie *Revuo Esperanto* kaj *Esperantista Vegetarano*. Mi mem ofte uzas ĝin por la belgaj revuoj *Horizon-taal* kaj *Esperanto en Marche*, por miaj Eksterrete-libretoj kaj... por ĉi tiu raporto.



Mallonge

http://

MALLONGIGI

OPCIOJ DE LIGILO

Ĉu vi scias, ke vi povas ŝanĝi la finon de URL-adreso klakante al "Opcioj de ligilo"?

Bedaŭrinde Facebook blokas ligilojn de mallonge.net. Ni provas jam de iom da tempo tion enordigi, sed ĝis nun ne sukcesis. Ni persistos.

2/08: Robin tradukis la interfacon de w.wiki al Esperanto. Ĝi estas URL-mallongigilo specife por vikimediaj retejoj. Vidu <https://w.wiki/YWF>

🌐 Esperanto



Ĉefpaĝo
Aktualizaĵoj
Ĉiuj tradukoj
Lastaj ŝanĝoj
Hazarda paĝo
Helpo

Speciala paĝo

URL-mallongigilo


Alglui vian longan URL ĉi tie

URL * **Mallongigi**

Ligiloj al la sekvaj domajnoj povas esti mallongigitaj: *.wikipedia.org, *.wiktionary.org, *.wikibooks.org, *.wikinews.org, *.wikiquote.org, *.wikisource.org, *.wikiversity.org, *.wikivoyage.org, *.wikimedia.org, *.wikidata.org kaj *.mediawiki.org.

Tajpi

En julio 2020 mi sendis mesaĝon al la kreinto de la ĉapeliga programo Tajpi por konvinki lin kunlabori kun UEA kaj Fonduso Instigo. Bedaŭrinde neniam venis respondo. Mi poste faros novan provon.



Esperanto-Tago NL

La 26-a de julio estas Esperanto-Tago - tago de lingva justeco.

Mi tradukis la nederlandlingvan version, kiam mi konstatis ke neniu alia jam faris tion. (<http://linguistic-rights.org/esperanto-tago/2020/>)

Teknika asistado kaj komputila kapabligo

En 2020, malgraŭ la kronviruso, mi plurfoje vizitis Jean Annet, la prezidanton de la Valona Esperanto-Asocio, por helpi lin pri ĉi tiaj konkretaj demandoj:

- Kio estas bonaj vortaraj aplikaĵoj por Android? Kiel instali kaj uzi ilin?
- Kiun programon uzi por la ĉapelitaj literoj en Mac OS X?
- Kial kaj kiel instali kaj efike uzi Telegram por nia agado?

Mi estis en la hejmo de kelkaj aliaj esperantistoj por ilin tiel helpi. Ni kapablighis niajn agantojn!

Eraroj en retpaĝoj - malerariga kampanjeto (ekzemplo)

“Ĉi-tie estas listo de 1176 e-libroj.

Klaku sur la numero por ordoni la libron per retmesaĝo.”

Atentu:

- Ĉi-tie: ne uzu streketon inter ‘ĉi’ kaj ‘tie’. Prefere uzu “Jen” en tiu frazo.
- temas pri bitlibroj, ne pri e-libroj. Antaŭe “e-libroj” estis uzata, sed nun ne plu. Estis tro malklare, ĉu e- temas pri elektronika aŭ Esperanta...
- Librojn oni ne povas ordoni (NL: bevelen). Ĉu vi celas “mendi”? Vidu https://vortaro.net/#ordoni_kd
- “Klaki” estas ne transitiva verbo. Prefere uzu “Alklaki” aŭ “Premi”. Pordo klakas, sed ligilon oni alklakas. Vidu https://vortaro.net/#klaki_kd

Mia propono:

“Jen listo de 1176 bitlibroj.

Alklaku la numeron por mendi libron per retmesaĝo.”

Aldono: mia eksterreta agado


Mi ne nur agas rete, sed mi ankaŭ estas vortaristo, provlegas, instruas Esperanton kaj enpaĝigas librojn kaj revuojn kaj (kun)redaktas. Jen mallonga superrigardo de mia eksterreta agado.

Nova PIV / vortara laboro

Krom pri komputila vortaro, mi okupiĝadas ankaŭ pri la vortaro Esperanto-nederlanda-Esperanto. Mi transprenis tion de nia flandra vortaristo Petro Desmet'. En 2020 aperis ekzemple nova, 1000-paĝa Vasta Vortaro PIV-ido. Vidu https://retbutiko.be/trovu/vasta_vortaro.



Robin helpas min pri la vortara laboro kaj estis invitita de Bertilo Wennergren al la PIV-teamo. Robin detale listigis ĉion, kion oni aldonu, korektu, plibonigu kaj forigu. La listo jam enhavas pli-malpli 1200 erojn. Ĉiufoje kiam mi renkontas iun vorton, kiu mankas en PIV, mi sendas ĝin al Robin. Robin laboras tre detale, kaj ne nur enhave, kaj ekzemple helpis pri la akompanaj teksto kaj bildo, kiuj aperas kiam oni konigas la retejan adreson de PIV per Telegram, Facebook aŭ Twitter:





Nova vortaro nederlanda - Esperanto

Surbaze de ekzistanta, en 2005 aperinta vortaro nederlanda-Esperanto, mi pretigas novan vortaron. Mi taksas, ke ĝi aperos... en 2030. Estas multege da laboro! La baza ideo estas kompletigi la novan vortaron per PIV-ido. Ĝi “riskos” iĝi 1500- ĝis 2000-paĝa verkego. Eble ni kreos du versiojn: vastan bitan kaj reduktitan paperan... Por plirapidigi la realigon de la vortaro, Klaas Dijkstra kaj mi provis duonaŭtomatigi la laboron. Ĝis nun ni ankoraŭ ne tute sukcesis pri tio, sed ni plu klopodos.

Provlegado

Mi estas unu el la provlegantoj de Eldonejo Libera. En 2019-2020 mi ekzemple provlegis ‘*Amo kaj malamo*’ de Julian Modest kaj *Taalcursus Esperanto*, ‘*Aspiroj*’ kaj ‘*Alieniĝo*’ de Lode Van de Velde.

Eddy Raats fine de 2020 estis mortanta kaj petis mian helpon pri la finpretigo de sia aŭtobiografio. Kun Lode Van de Velde mi vizitis lin kelkfoje, kaj ni sukcesos baldaŭ eldoni tiun verkon.

Enpaĝiga laboro

En 2020 aperis jenaj de mi provlegitaj kaj enpaĝigitaj verkoj ĉe Flandra Esperanto-Ligo (FEL):

- PIV-ido: 1000-paĝa Vasta vortaro Esperanto-nederlanda
<https://retbutiko.be/eo/ero/pivi>
- Oklingva proverbaro <https://retbutiko.be/eo/ero/okpr>

Mi enpaĝigas tri belgajn revuojn:

- Horizon-taal: dumonata flandra revuo de FEL
<https://esperanto.be/horizontaal>
- Vertikale: jara eldono de FEL por estraranoj kaj aktivuloj

- **Espéranto en marche:** trimonata eldono de la Valona Esperanto-Asocio. Ĝin mi ne nur enpaĝigis, sed ankaŭ grandparte redaktis.
<https://mallonge.net/eo-marche>

Instruado

Malgraŭ la kronviruso, mi tamen sukcesis iom instrui al malgrandaj grupoj. Mi ekzemple instruis en oktobro 2020, promenante en Charleroi (Belgio) kaj “paroligante” ĉiĉeronis etan internacian grupon en Antverpeno en decembro. Kutime mi instruas dufoje jare al progresantoj dum la studosemajnfino de Esperanto Nederland. Mi virtuale instruis en novembro.

Okazigo de “hibridaj” kunvenoj

Klaas Dijkstra kaj mi jam delonge revas pri kunvenoj kiuj okazas samtempe surloke (ĉeeste) kaj per la interreto. Jen bela bildo pri nia agado de la loka klubo en Antverpeno (Belgio)! <https://esperanto.be/antwerpen>



Nova katalogo por FEL

Mi estas “oficiala volontulo” de Flandra Esperanto-Ligo. En 2020 mi kreis por ili novan katalogon. La antaŭa aperis en 2006.

Elŝutu la novan katalogon ĉi tie: <https://esperanto.be/fel/but/katalogo.pdf>




Planoj por 2021

Bildaro

Lode Van de Velde kaj mi kreas novan retejon: Bildaro. Ni taksas, ke tro da esperantistoj konigas inspirajn bildojn kun tekstoj en la angla. Ni celas proponi kolekton de alternativaj bildoj kun tekstoj en Esperanto (foje aldone ankaŭ en aliaj lingvoj). Kategorioj de la retejo estos ekzemple Inspiro, Filozofio, Kristnasko, Novjaro, Naskiĝtago, Pasko, Haloveno...

La nova retejo estas projekto kiun ni realigas kunlabore kun E@I kaj Movado sen Nomo, kies prezidanto estas Lode. Ankaŭ ek-kunlaboris Eugenio Hansen, kiu kreis multajn mirindajn ĉi tiajn bildojn:



Paroligaj kursoj per Telegram

Mi jam ofte instruis kaj ĉiufoje denove rimarkis, ke (iuj) lernantoj malrapide progresas aŭ post iom da tempo rezignas. Laŭ mi, ni instigu esperantistojn ĉiutage iomete pri Esperanto okupiĝi – eĉ se nur dum dek minutoj. Tial mi kreis tri belgajn Telegram-kursgrupojn laŭ la eŭropa referenckadro: A2 por komencintoj, B2 por progresantoj (mi fokusas mian atenton unuavice al tiu nivelo) kaj C1 por fluparolantoj. Ĉiusemajne ni elektas alian temon. Kursanoj de la grupoj B2 kaj C1 registras sin mem per poŝtelefono aŭ komputilo. La rezultan filmeton aŭ sonregistraĵon pri la temo ili sendas al la Telegram-kursgrupo. Mi detale komentas la 'senditaĵojn' kaj en la fermita/privata kursgrupo afiŝas informojn pri plibonigebloj, por ke ĉiuj kune ni lernu de la faritaj eraretoj.

La kurso temas ne nur pri lingvo-instruado, sed ankaŭ pri kapablo kaj instigado esperantumi: ĉeesti retajn prelegojn, legi librojn, aboni revuojn, malkovri servojn,... Provizore la kursoj celas nur belgojn. Mi provos en 2021 lanĉi tiajn internaciajn kursojn. Mi unuavice celas kapabligi estraranojn kaj aktivulojn.

Plurlingvigo de la projekta retejo Instigo-Liberapay

Mi ekuzis novan domajnon por mia fonduso: www.instigo.be

Robin kreis ĉi tiujn facilajn ligilojn al la alilingvaj prezentoj de ĝi:
www.instigo.be/nl - www.instigo.be/fr - www.instigo.be/de ktp.


Interalie por pruvi, ke facile eblas realigi plurlingvan retejon pere de Esperanto kaj dank' al kunlaboremaj e-volontuloj, retejo de mia fonduso ekzistas en dek lingvoj. Helpis pri la tradukado interalie jenaj homoj:

- nederlanda: Lode Van de Velde - www.instigo.be/nl
- franca: Jean-Pol Sparenberg - www.instigo.be/fr
- portugala: Fernando Ŝajani - www.instigo.be/pt
- kataluna: Xavi Alcalde - www.instigo.be/ca

Mi bedaŭrinde ne sufiĉe zorge notis, kiu tradukis kaj/aŭ provlegis la aliajn versiojn. Se temas pri vi, bv. kontakti min. Tuj mi aldonos vin kiel tradukinton. Mi planas krei kromajn lingvajn versiojn. Estonte, unufoje jare mi ĝisdatigos la priskribon de mia fonduso en ĉiuj lingvoj.

Nova teama komunikilo

Fernando Ŝajani kaj Robin van der Vliet jam kunlaboras kun mi per Telegram kaj GitHub. Estonte ni kunlaboros ankaŭ per Todoist. Dank' al donacoj al la Fonduso Instigo, ni uzas pagan version kiu donas pli da ebloj. Ni esperas per ĉi tiu nova ilo pli-strukturigi, pli-efikigi kaj pli-intensigi nian laboron.



Nova ebla partnero 1: MiaVivo

Mi provlegis erojn de la nova retejo MiaVivo. Johannes Genberg ŝatus kun sia retejo www.miavivo.net aliĝi al Fonduso Instigo; mi esploras kun li, ĉu kaj laŭ kiuj kondiĉoj tio eblus.



Nova ebla partnero 2: Jezer Dorante


Jezer Dorante estas talenta venezuela aktivulo kaj jutubisto. Li interalie kreis filmeton pri la privateca politiko de WhatsApp kaj Facebook. Mi jam delonge volas kun li kunlabori, sed ĝis nun ni ne sukcesis trovi taŭgan formulon. Espereble pri tio ni ja sukcesos en 2021!

Vidu www.mallonge.net/jezer

Nova ebla partnero 3: esperantigo de LanguageTool

<https://languagetool.org>

Lingvoilo (LanguageTool) estas malfermitkoda plurlingva programo por kontroli ortografion, gramatikajn erarojn kaj stilon de tekstoj. Ĝi funkcias por dudeko da lingvoj kaj Esperanto estas unu el ili. “Lingvoilo” atentigas krom pri tajperaroj, ankaŭ pri eraroj, ne trovitaj per simpla literuma kontrolilo. Estas avantaĝo de Lingvoilo, ke oni povas uzi la programon ne nur en ĝia retejo, sed oni povas elŝuti kromaĵon (suplementan aldonan programeton) por sia retumilo. Post la instalado sufiĉas nur marki iun tekston per la muso, kaj la kromaĵo povas tuj indiki la eventualajn literumajn aŭ gramatikajn erarojn... (!)¹



Ni rimarkis, ke malaperis la Esperanta versio de la retejo. Antaŭe ĝi tamen ekzistis. Dominique Pellé komencis la Esperantan projekton. Li prilaboris ĝin ĉefe inter 2010 kaj 2018, sed nun ne vere plu aktive kunlaboras. Ekde 2018 Robin van der Vliet kontribuas. Robin aldonis sufiĉe multajn novajn regulojn, kaj korektis sufiĉe multajn erarojn. Kelkaj esperantistoj scias, ke Robin prilaboras ĝin, kaj kelkfoje ili faris proponojn, por plibonigi la korektilon.

Verŝajne la esperantigo de LanguageTool iĝos parto de Fonduso Instigo. Mi taksas la projekton grava, utila, subteninda kaj tre diskoniginda.

Robin pli-malpli sola okupiĝas pri la esperantigo kaj sencimigo de LanguageTool. Robin revivigos ne nur la esperantlingvan retejon, sed planas esperantigi la tutan interfacon de la Lingvoilo.

¹ <https://www.facebook.com/Ret.Info/posts/literumiloj-kaj-ortografia-kontrolado-en-esperantolingvoilo-languagetool-estas-l/1296999257046180/>

Subtenebloj

Ĉu vi volas subteni la agadon de retaj agantoj?



Instigo-Liberapay – www.instigo.be

Homoj kiuj kontribuas al komunaj bezonas vian subtenon. Konstruado de retejo, tradukado, instigado, varbado – tiuj aferoj postulas tempon kaj kostas monon, ne nur por ekfari la laboron, sed ankaŭ por ade ĝisdatigi retejojn kaj daŭrigi la agadon. La sistemo de periodaj donacoj de Liberapay estas desegnita por provizi stabilan amasfinancitan bazan enspezon al kreantoj, ebligante ilin daŭre fari la laboregon, kiu profitas al ĉiuj.

Se vi volas subteni mian retan agadon aŭ tiun de agantoj kiel Robin van der Vliet, Fernando Ŝajani, Iván Garcia kaj KuboF Hromoslav, prefere donacu per la retejo de Liberapay: <https://eo.liberapay.com/instigo>

Donacoj al Instigo per Liberapay estas anonimaj, krom se vi ĝiras monon per PayPal. Ĉu vi volas esti menciita kun persona aŭ asocia nomo en la venonta jarraporto kiel donacinto? Ĉu vi volas subteni specifan projekton aŭ aganton? Tio eblas – sendu mesaĝon al <yves@ikso.net>.

Instigo-FEL

Se vi estas privata donacanto kaj loĝas en Belgio, povas esti favore donaci al la fonduso Instigo ĉe Flandra Esperanto-Ligo. Donacoj de 40 aŭ pli da eŭroj estas subtraheblaj de via imposta enspezo en Belgio laŭ la kutimaj kondiĉoj. Menciu nepre “Gift Instigo” se vi volas donaci per FEL.

Instigo-Verdaj Skoltoj

Instigo-Liberapay estas ligita al la konto de la belga asocio Verdaj Skoltoj. Teorie eblas ankaŭ rekte ĝiri al tiu konto. www.verdajskoltoj.net

Ĉu vi ŝatus subteni Fonduson Instigo, sed hezitas? Ĉu vi kunlaboremas? Kontaktu min per <yves@ikso.net> aŭ <https://t.me/yvesnev>